



HOMO kaj KOSMO

PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Jus aperis

N-ro 2/1975

Mendu ĉe Pickel
Libroservo
Nürnberg

Eldonanto/Herausgeber

Ludwig Pickel
Postfach 2113 1
D-85 Nürnberg
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 22/1975 13 junio 1975 =====

Aperas ĉiusemajne

Turneo de Pola Esperanto-Teatro finita

Nürnberg (pp). Kun bona sukceso finiĝis la turneo tra FRG de la Pola Esperanto-Teatro kun la geaktoroj Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynsky. La lasta prezentado okazis en Paderborn, merkrede la 11 junio, en la universitato.

Entute la Pola Esperanto-Teatro ludis la komedion "Proksima Nekonato" en Oberkirch, Nürnberg, München, Augsburg, Stuttgart, Bonn kaj Paderborn.

Pri la prezentado en Stuttgart skribas pastoro Adolf Burkhardt, Bissingen, kiu kune kun sia edzino ĉeestis:

"Ekster la kadro de internaciaj kongresoj, nur malofte prezentas sin okazo por ĝui tiel altnivelan manifestiĝon de la 'vivanta lingvo de vivanta popolo' Esperanto kiel dum la ĵusa turneo de Pola Esperanto-Teatro. Ludi burleskon, kiun oni komprenas pli malpli sen vortoj, ne estas risko en iu lingvo. Ludi komedion, kies efiko dependas preskaŭ ekskluzive de longaj dialogoj, kaj ludi ĝin en lingvo internacia, do ne gepatra, estas tre kuraĝa ago. En Stuttgart, la ejo ne estis aparte taŭga, kaj 30 spektantoj eble ne tro stimulus la vervon de aktoroj kutimiĝintaj al granda publiko. Sed tre rapide Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynski forgesigis ĉion malpli oportunan kaj plene kaptis la atenton per la mature prezentata "Proksima Nekonato" en senriproĉa lingvo kaj intereso-kapta ludo. Pli taŭgajn kultur-ambasadorojn el la patrujo de la Internacia Lingvo oni apenaŭ povus imagi. La plezuro estis perfekta, la danko sincera kaj elkora - ankaŭ al L. Pickel, la aranĝinto en FRG."

Pri Eŭropa Esperanto-Revuo

Nürnberg (pp) Vendrede, la 20 junio, eliros la 3a numero de Eŭropa Esperanto-Revuo.

Krom la kutimaj rubrikoj "Eŭropa Panoramo" kaj "El la Germana Esperanto-movado" ĝi enhavas jenajn artikolojn:

Prof. d-ro Helmar Frank, Lingvopolitiko por Eŭropo
Dua parto kaj fino

D-ro A. Baur, Pri la svisgermana kaj malaltgermana lingvoj
Du prelegoj kadre de Radio Bern

Pola Esperanto-Teatro en FRG, traduko de recenzo en gazetoj
de Nürnberg

Hugo Greff, "Al Torento" - ideologikritiko kun enkonduko de
Reinhard Haupenthal

Ephraim Kishon, Kie troviĝas Tuval, satiraĵo en la Esperanto-
traduko de Gerhard Ziegler

Eŭropa Esperanto-Revuo estas havebla ĉe Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1,
Postfach 2113. Jara abono 16 GM. Unuopa ekzemplero kostas 2 GM.

Eŭropa kooperad-projekto Pedagogiko - Interlingvistiko -
Kibernetiko

Paderborn (pp). Ĉi-sekve ni publikigas la unuan parton de la Projekt-
Ĉadro-priskribo de Eŭropa kooperad-projekto Pedagogiko - Interling-
vistiko - Kibernetiko elverkita de prof. d-ro Helmar Frank:

1. Ĝenerala celo

- 1.0 La projekto fariĝu modelo pri kaj interfaka kaj internacia kun-
laboro en teorio kaj praktiko.
- 1.1. La planlingvo-didaktiko postulas kunlaboradon inter pedagogiko
kaj interlingvistiko; interlingvistiko kaj kibernetiko renkontiĝas
en lingvo-kibernetiko; unu el la radikoj de la moderna klerig-
teknologio estas la kibernetika pedagogiko.
- 1.2 La diversspeca scienca okupiĝo pri la sama klerig-praktika pro-
jekto, nome la planlingvo-instruado en diversaj ĉefe Eŭropaj
landoj, kondukas al internacia kunlaborado de klerig-teknologoj
(ĉefe kibernetaj pedagogoj), lingvo-kibernetikistoj kaj plan-
lingvodidaktikistoj trans lingvolimojn.
- 1.3 Kie tiu ĉi kunlaborado tuŝas kibernetikon, ĝi povas okazi i.a.
en la kadro de la Laborgrupo "Kibernetiko" aŭ de la Laborgrupo
"Interlingvistiko kaj Lingvo-kibernetiko", t.e. du laborgrupoj
en "Asocio pri Programita Instruado kaj Peril-didaktiko (GPI)",
kiu estas koresponda membro de UNESCO.

2. Preparlaboroj

- 2.1 En 1974 sukcese finiĝis trijara planlingva eksperimento internacia
en la landoj Bulgario, Jugoslavio, Italio kaj Hungario (komence
ankaŭ Aŭstrio partoprenis) sub scienca akompanado fare de la inter-
lingvisto Prof. D-ro I. Szerdahelyi (Budapest) kaj sub aŭspicio
de UNESCO. Sume partoprenis ĉ. 1000 gelnantoj de diversaj jar-
klasoj el kvin (komence ses) lingvo-teritorioj. La instruadon
organizis la internacia instruista organizaĵo ILEI.
- 2.2 Ekde septembro 1974 en FRG-lando Nordrejn-Vestfalia, ĉirkaŭ 400
gelnantoj de la duagrada ŝtupo de ĉiuj tri lernejoj tipoj
(gimnazio, "duagrada supera lernejo", "duagrada lernejo") parto-
prenas la laŭregulan planlingvo-instruadon de la lernejo kutime
en formo de lernejaj laborrondoj. La majoritato de la lernejaj
klasoj troviĝas en Paderborn, la sidejo de la GPI-laborgrupo
"Interlingvistiko kaj Lingvo-kibernetiko".
- 2.3. Paderborn estas ankaŭ la sidejo de la germana "Esplor- kaj Evolu-
centro pri objektivigitaj Instru- kaj Lernprocedoj (FEoLL)". Ties
"Instituto pri Kibernetika Pedagogiko" kreis por siaj diversaj es-
plor- kaj evoluprojektoj komunan ponton al la praktiko per
"integrita kampostudo planlingvo-instruado". Tiu studo komenciĝis
en decembro 1974. Ekde februaro 1975 ĉirkaŭ 120 gelnantoj el
elementaj lernejoj (6 klasoj, 3-a lerneja jaro; 9-jaruloj) regule
ricevas posemajne du lecionojn en planlingvoinstruado, el tio
la duonon por la aŭddvida klasinstru-aŭtomato Robbimat II Simplex,
evoluigita fare de la Instituto pri Kibernetika Pedagogiko. Tiu
Instituto produktas por ĉiu el la 40 lecionoj de la Korte-lerno-
libro (Sub la verda standardo) po du instruprogram-lecionojn. -
La instruadon organizas la internacia "Societo pri lingvolim-
transpaŝa Eŭropa interkompreniĝo".

- 2.4 Ekde somero 1975 ILEI okazigos 2-an planlingvan eksperimenton internacian - ĉi-foje surbaze de la Korte-libro kaj unuece en la elementa lernejo (3-a kaj 4-a lernejaj klasoj). Ĝis nun certe partoprenos lernejoj el FRG, Francio, Italio kaj Aŭstrio. Oni ne antaŭvidas la uzadon de klerig-teknologiaj iloj.
- 2.5 Krome (sed por la elementa lernejo sin bazigante sur la samajn instruaĵojn kaj instrucelojn, tiel ke internaciaj kompar esploroj eblos) diversaj germanaj sciencistoj kaj esplorgrupoj planas disvastigon de la kampostudo veninta el la Instituto pri Kibernetika Pedagogiko ekde 1976, parte kun antaŭeksperimentoj ekde 1975. Tiu ĉi projekto portas la nomon "BAFELD" (ekzamenado kaj pluen-evouligado de klerig-teknologiaj komencaĵoj de la fremdlingvo-didaktiko, instru-planad-teorio kaj legasteni-terapio per kampo-studoj). Per la BAFELD-projekto oni havos planlingvo-instruadon antaŭvideble en la FRG-landoj Nordrejn-Vestfalio, Berlino, Heslando, Slesvig-Holstinio, Malsupra Saksio, Baden-Virtembergo kaj Hamburgo - eble ankaŭ en la kvar ceteraj FRG-landoj. La partoprenantaj sciencistoj kaj esplorgrupoj ankoraŭ ne estas definitive fiksitaj. Ĝis nun interesiĝis pri kunlaboro la profesoroj K. Alsleben (Hamburg), D-ro F. Biglmaier (Berlin), D-ro K. Boeckmann (Reutlingen), D-ro K.D. Graf (Berlin), D-ro W. Hammel (Paderborn), D-ro L. Issing (Berlin), W. Lahn (Berlin), D-ro U. Lehnert (Berlin), H.E. Piepho (Giessen), D-ro Brigitte Rollet (Kassel k, Osnabrück), D-ro W.F. Schmid (Flensburg) kaj D-ro K. Weltner (Frankfurt); krome partoprenos la FEoLL-Institutoj pri Kibernetika Pedagogiko (Direktoro: Prof. D-ro H. Frank) kaj pri Klerig-entrepena Instruado (Direktoro: Privatdocento D-ro D-ro G. Ortner). En la projekto BAFELD oni ĉefe (sed ne nur) esploras la planlingvo-instruadon kaj lingvoorientiĝ-esploron ekde la 3-a lerneja jaro. Interalie oni komparas diversajn metodojn de la klasinstruado (rekta instruado per diversaj instruiloj; aŭtomata diapozitiv-prezentado kun sonbendo; klasa instruaŭtomato sen detumilo (= komputilo); detumi-asista instruado).
- 2.6 BAFELD povas fariĝi la FRG-kontribuo al la estonta eŭropa kooperad-projekto Pedagogiko-Interlingvistiko-Kibernetiko (EKPIK), kiu povas efektiviĝi nur tiam, se apud la planlingvo-instruado kaj lingvoorientiĝ-instruado ekde la 3-a lerneja jaro povas okazi samloke koncizaj planlingvo-kursoj por pli aĝaj gelnantoj sciantaj minimume unu fremdlingvon, kaj por gepatroj ekzemple nur lego-kapabla kurso (40 studhoroj eventuale surbaze de la unua duono de la Assimil-kurso plume de Thierry) aŭ normala kurso surbaze de la lernolibro de Szerdahelyi. Ankaŭ ĉi tiuj kursoj fariĝu objektoj por sciencaj esploroj.

3. Tempoplano

- 3.1 La instruado planenda kaj observenda flanke de EKPIK komenciĝu en somero 1976 kaj ampleksu por ĉiuj gelnantoj de elementaj lernejoj du jarojn; eventuale oni povas pliprofundige daŭrigi la instruadon dum tria studojaro kaj lasi ĝin eniri en lingvoorientiĝ-kurson (kiel decidhelpe por la elekto de la tuj poste lernenda fremdlingvo). En la observadon oni inkludu ankaŭ po minimume unu sekvan klason de la sama lernejo, kiu komencos en 1977 la saman instruadon. La partopreno de la gelnantoj povas esti libervola. La observado de la transfero al la fremdlingvo-instruado daŭru ĝis 1980.
- 3.2 Prepar-cele oni observu (kaj laŭbezone kreu) klasojn por plan-

lingvo-instruado en laŭeble multaj el la partoprenantaj landoj ekde la lerneja jaro 1975/76.

- 3.3 Diskonigado de EKPIK okazas ankoraŭ antaŭ la 3-a Praga Konferenco pri Kibernetika Pedagogiko (26. - 28.5.1975) per dissendo de tiu ĉi projektkadro-priskribo al pli vasta rondo de eblaj kunlaborantoj; la projekton oni konkretigos dum interparoloj kun interesitoj dum la Praga Konferenco. Krome oni daŭrigas la jam komenciĝintajn interparolojn kun projekt-partoprenantoj el Francio, Danlando, Belgio, Italio, Jugoslavio kaj Hungario. Oni planas ke laŭeble multaj raportu dum la 14-a GPI-simpozio (21-24-4-1976 en Hamburgo) pri siaj preparlaboroj al la fakularo. La Pragaj konferencoj pri kibernetika pedagogiko kaj la aranĝoj de GPI taŭgas ankaŭ por la posta publikigo de inter- kaj finrezultoj.

4. Partoprenantoj

- 4.1 En ĉiuj naŭ ŝtatoj de la Eŭropa Komunumo plej malfrue ekde 1976 partoprenu minimume unu esplor-instituto kaj minimume unu elementa lernejo la projekton. Jam nun tio ŝajnas esti fakte certa en Belgio, Danlando, Francio, FRG kaj Italio.
- 4.2 Analoga celo en la COMECON-landoj estas pli facile atingebla pro la pli granda signifo, kiun tie gajnis kaj la kibernetika pedagogiko kaj la interlingvistiko, ĉefe en Pollando, Hungario kaj Bulgario, kie jam ekzistas solida klerig-teknika bazo, sed ankaŭ en Ĉeĥoslovakio kaj en Sovetio, kie oni jam faras multan preparlaboron sur la scienca flanko.
- 4.3. La ceteraj Eŭropa landoj ankaŭ partoprenu, se tio iel estas ebla. Jugoslavio kaj Aŭstrio preskaŭ certe partoprenos.
- 4.4 La klopodado pri ĉefe Eŭropa kooperado okazas unuflanke pro tio, ĉar oni devas minimumi la investo-kostojn, aliflanke pro la por la projekto favora granda lingvo-riĉeco en Eŭropo. Sed kompreneble oni ne ekskludu ne-Eŭropajn ŝtatojn, kun kiuj jam ekzistas kunlaborado sur la kampo de kibernetika pedagogiko (Argentino, Brazilo, Kanado, Peruo, Usono). Oni alstrebas la kunlaboradon de almenaŭ unu lando en ĉiu kontinento ekster Eŭropo.

5. Avantaĝoj por la partoprenantaj sciencistoj

- 5.1 Partopreno en EKPIK ebligas al sciencistoj la aliron al sume granda nombro de observataj gelnantoj kaj studhoroj. Tio donas la eblecon, modelece studi multnombrajn science-pedagogajn detal-demandojn (peril-aplikado; inform-mezurado; transfer-fiksado; lingvo-didaktiko; instru-planado; enkonduk-rapido de novaj instruajtoj; diferencoj kompare al la projekto pri frua anglalingva instruado rigardata kiel fiaska flanko de fakaj kompetentuloj).
- 5.2 En neniu el la koncernaj landoj oni jam havas planlingvo-instruadon element-lernejan en jam firme enradikiĝintaj formoj. Do, la internaciigo de la projekto ne renkontos malfacilaĵojn pro laŭ lande specialaj formoj de la instruajtoj. Kontraste al ĉiu alia instruajto oni povas ĉi tie, se oni deziras, labori ĉie laŭ la sama instruprogramo aŭ lernolibro. La klerig-praktika elprovado kaj enkonduko de klerig-teknologiaj evoluaĵoj ne endanĝerigas ĉe interlingvistikaj instruajtoj longe provitajn instruplanojn kaj instru-procedojn; do, ĝi ne spertos reziston de instruistoj, lernejestroj kaj administraciaj instancoj.

(La fina parto aperos en la venonta numero de PP)